

Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

115-a jaro - N-ro 364 - Septembro 2022

Dua Centjaro de l' Sendependeco de Brazilo (1822 - 2022)



Intervjuo

Paĝo 7

**Nia literatura
panteono**

Paĝo 8

**Programo Mia
Amiko**

Paĝo 9

**Francisco
Mattos**

Paĝo 12

Brazila Esperantisto

Nacia kaj Internacia Kulturo
115-a Jaro • N-ro 364 • Septembro 2022



Kovrilo: Evandro Avellar

Enhavo

- 01 Ĉefartikolo** Brazilo, 200 jaroj: La princino kaj la poligloto
- 03 Lingva angulo** Plena (kaj nepra) Gramatiko de Esperanto
- 04 Lingva angulo** Pliriĉigu Vian Vortprovizion
- 06 Debuto** Dudek Jarojn sen Fernando Marinho
- 07 Intervjuo** Querino Neto
- 08 Literaturo** Nia Literatura Panteono: Ferenc Szilágyi
- 09 Movado** Programo Mia Amiko
- 11 Kroniko** Francisco Mattos de Oliveira
- 12 Nekrologo** Francisco Mattos de Oliveira

Enkonduko

La Lingvo Internacia burĝonis kaj kreskis dum unu el la plej frenezaj jarcentoj de la ĵusa okcidenta historio. En ĝi okazis senprecedencaj militoj, revolucioj, kulturaj kaj moraj ŝanceliĝoj.

Kompreneble, ankaŭ Esperanto estis kaj estas influata multflanke de tiaj ideoj. Tiu, kiu atente studas nian historion, bezonas scii pri la monda fono por kompreni la rolon de SAT, la laboristan movadon, la malpermesojn en Portugalujo kaj Germanujo dum la 30-aj jaroj, la persekutojn kaj murdojn en sovetaĵoj, la apogon de UN kaj tiel plu. Ĉio estas historio. Ĉie estas ideoj.

Nia BE restas fidela al la internaciisma ideo de Zamenhof, unu el la pensuloj de tiu epoko, kaj per siaj artikoloj penas disvolvi kaj vekti la kleriĝon de siaj legantoj.

Ni esperas, ke ĉi tiu numero iel helpos renovigi vian idealon kaj plifortigi vian homaranisman senton, por fruktodona laboro



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo
Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
113-a jaro, N-ro 362, Aŭgusto 2020

Eldona Stabo

Ĉefredaktisto: Cícero Gabriel C. Soares
redakcio@esperanto.org.br

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Adonis Saliba, Cícero Soares, Eurípedes Barbosa, Fernando Pita, Hilmar Ferreira, Leandro Abrahão, Querino Neto

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Evandro Avellar

Revizio kaj tradukado: Josenilton kaj James Piton

Kontribuajojn kaj mesaĝojn sendu al la ĉefredaktisto: redakcio@esperanto.org.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem



Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907

Sidejo: SDS-Bloco P36-Salas 301/303-Ed. Venâncio III
CEP 70393-902 Brasília, DF

Telefono: (0xx61) 3226-1298

Retadreso: bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo: www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto: Evandro Avellar

Financdirektisto: Fernando Maia Jr. Kasisto: Sônia Maria A. Lucio

1-a Sekretario: Rodrigo Tavares P. De Medeiros 2-a Sekretario: Leandro Oliveira Freitas

3-a Sekretario: Márcia Maria C. Avellar

Kontrola Konsilantaro

Eurípedes A. Barbosa, Darci Sardinha, Maria Das Dores Goes

Komitatano-A

Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.

Revunkunlaboraĵoj: La ĉefredaktisto rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** ne sciigi la ricevon; **2-e:** ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** ne garantii la publikigon; **4-e:** mallongigi tekstojn tiam, kiam necese; **5-e:** ilin reviziigi laŭ ortografio, gramatiko kaj fakvortoj. **a)** Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, de Bertilo Wennergren. **b)** La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2020) oni aparte klarigu per piednotoj aŭ glosaro. **c)** Ni uzos esperantigitajn ŝtato-nomojn kaj urbo-nomojn trovitajn en <http://vortaro.esperanto.org.br>. **d)** Ĉiam kiam eblas ni uzos simplajn vortojn kompreneblajn kaj konstruatajn surbaze de la krea kapablo de Esperanto anstataŭ la novaj radikoj (neologismoj) laŭ <http://bonalingvo.net/>. **e)** Ni uzos la sistemon -UJO por landnomoj laŭ la fundamentaj reguloj de la lingvo (kiujn oni eltiras el la libreto La Fundamento de Esperanto).

Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustrati kaj apartenas al la posedantoj.

Anonctarifoj: Tabelo pri prezoj de anoncoj en *Brazila Esperantisto*, laŭ paĝonoj.

tutpaĝa (18x25cm)
4-a kovrilo
R\$ 900,00 (kolora)
3-a kovrilo
R\$ 600,00
(nigra-blanka)

1/2 duonpaĝa
(9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-
blanka)

1/3 trionpaĝa
horizontale
(18x8cm) R\$ 300,00
(kolora)
R\$ 200,00 (nigra-
blanka)

1/3 trionpaĝa
vertikale
(5,8x24cm)
R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-
blanka)

1/6 sesonpaĝa
(5,8x12cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-
blanka)

Brazilo, 200 jaroj: La Princino kaj la Poligloto

Cícero Soares



Leopoldino estis aŭstrino el la dinastia familio Habsburgo. Ŝi havis specialan princinan edukitecon por plenumi siajn oficialajn devojn. Ene de tiuj devoj enestis tio, prepariĝi por interdinastia edziniĝo, same kiel okazis al ŝia fratinino, elektita de la imperiestro Napoleono. Pro tio, la intelektulino Leopoldino havis rafinitan instruadon, neordinaran eĉ al viroj tiutempaj. Speciale ŝin ravis mineralogio, kiun ŝi funde studadis. Ŝi estis nur 20-jara, kiam ŝi eksciis, ke ŝin svatas 21-jara princo, heredonto de la portugala krono. Li nomiĝis Petro kaj loĝis en fora transocea lando. Lia reĝa familio fuĝe translokiĝis al la Nova Mondo naŭ jarojn antaŭe, trompinte Napoleonon mem, kiu invadis Portugalujon.

Nia princino ĝoje vidadis la donaceton liveritan de la Alcantara dinastio: oran medalon ĉirkaŭitan

de diamantoj. Tamen ne pro ĝia valoro ŝiaj romantikaj okuloj ĝojis, sed pro la busto de la bela princo ĉizita sur ĝi. Post perprokura edziniĝo, Leopoldino entreprenis la longan kaj danĝeran vojaĝon sur velŝipoj kaj post 5 monatoj kaj 8000 kilometroj ŝi alvenis al Rio-de-Janejro, en 1817, kie ŝi kaj Don Petro embarase ekkonis unu la alian.

JOZEFO BONIFÁCIO

Du jarojn poste, revenis al sia naskiĝa urbo, Santo, marborde de la tiama provinco San-Paŭlio, brazilano 56-jara, kiu, ekde sia junaĝo, studis kaj laboris en Eŭropo. Jozefo Bonifácio, jen lia nomo, estis unu el la plej prestiĝaj sciencistoj en Eŭropo siatempe, specialisto pri mineralogio, kiun li studis kaj esploris en Skandinavio, post siaj diplomoiĝoj pri Juro, Filozofio kaj Matematiko en la Universitato de Koimbro. Brila studento, li ricevis stipendion el Portugalio por studadoj pri Kemio kaj Mineralogio en aliaj eŭropaj landoj. Tiel li iris al Parizo inter 1790 kaj 1791, dum la varmo de la Franca Revolucio, kaj poste li studadis en Germanio, Belgio, Italio, Aŭstrio, Hungario, Svedio kaj Danlando. Pro tia longa sperto li ellernis modernajn lingvojn, sed li havis specialan preferon al la klasikaĵoj kaj ofte tradukis el la antikvaj latina kaj greka. Nia ilustrita intelektulo tamen estis praktika homo. Li brave batalis kontraŭ la soldatoj de Napoleono, kiuj invadis Portugalion dum la reĝo, Don Johano la Sesa, la patro de Petro, fuĝadas al Brazilo.

Praktika ankaŭ estis lia interveno en la Sciencon. Li priskribis kaj katalogis 12 novajn tipojn de rokoj, kaj, antaŭ ol reveni al Bra-

zilo, li akumulis dek unu profesiajn postenojn en Lisbono - la sama nombro da lingvoj, kiujn li sciopovis. Reirante al Brazilo, Bonifácio kunportis sian bibliotekon kun 6000 libroj.

LA MONARKIA FAMILIO

La geedzeca vivo de Don Petro kaj Leopoldino bone fluis dum la unuaj jaroj. La paro vivis kontenta kun sia unua filino, la heredotino de la trono. La portugala dinastio, malsimile al kelkaj aliaj, ne malpermesis virinajn heredajn rajtojn. Tamen la reĝa administrado de la portugala imperio, situanta en la fora Brazilo, malkontentigis kelkajn lisbonajn korteganojn. Don Johano kreis la nomatan Unuiĝinta Regno de Portugalio, Brazilo kaj Algarvo, en 1815. Sed furoris tiutempe la novaj ideoj pri konstitucio kaj respublikoj, kaj nur kvar jarojn post sia edziniĝo, Leopoldino vidis sian bopatron devigita reiri Portugalion, por trankviligi la revoluciulojn. Por la unua fojo post 700 jaroj da monarkio, portugala reĝo bezonis cedi parton de sia povo al konstituciiga asembleo.

La decidoj de tiu asembleo en Lisbono fariĝis pli kaj pli maloportunaj al brazilanoj kaj atingis sian pinton kiam oni nuligis la brazilajn tribunalojn kaj aliajn instituciojn kreitajn de Don Johano en Rio-de-Janejro. Lisbono reestablis la komercan monopolon inter Brazilo kaj Portugalio, kaj ordonis ke la princo Petro retiriĝu al Eŭropo. La provincoj de la kolonio estis dividitaj. Multaj brazilanoj estis lojalaj al la reĝo, sed tamen al multaj aliaj malplaĉis la humiliga situacio. Ekestis ondo de protestoj. Surstrataj kvereloj kaj eĉ bataloj ofte okazadis. Tiam Bonifácio skri-

bis leteron al sia princo, pledante en akra tono, ke li ne reiru al Portugalio: "krom perdi antaŭ la mondo la dignecon de viro kaj de princo, sklaviĝante al eta nombro da malordigantoj, vi ankaŭ devos respondi antaŭ la ĉielo pro la rivero el sango, kiu certe fluos tra Brazilo je via malĉeesto". En la San-Paŭlia provinco, la klerulo sukcesis pacigi kaj unuigi la popolon, kaj li portis al Petro peticion kun miloj da subskriboj, montrantan la apogon al la princo, petantan lian restadon. Kuraĝigita de tio, Don Petro decidis restadi, kaj komandis soldatojn kontraŭ la militistoj, kiuj du fojojn venis plenumi la ordonojn de Portugalio.

Leopoldino, kiu ĉion atestis kaj helpis sian edzon, iris ĉevalo de la bieno, kie ŝi protekte enlokigis sian familion, por koni persone la figuron de Jozefo Bonifácio. Ili komence interparolis en la franca, sed ĝentile Bonifácio pasis al la germana, la denaska lingvo de la princo. Ŝi estis profunde impresita de lia kulturo kaj saĝeco, kaj tion diris al sia edzo. Ŝi sciis, ke la vasta sperto de tiu nobla brazilano estos necesa al la juna princo. Kun nuraj 23 jaroj, Petro fariĝis oficiale la reganto de Brazilo. Tiam li kreis administradan skipon kaj nomumis Bonifácion kiel la ĉefministron. Por la unua fojo en la historio de la lando brazilano okupis tiel altan postenon. Neniu estis pli bone kapabla por tio.

Vere, oni ne povas paroli ankoraŭ pri lando, ĉar ĝi fakte ne ekzistis tia. Estis multaj malproksimaj provincoj, kaj por ilin unuigi Bonifácio rekomendas al la karisma princo vojaĝi tra ili por kontakti la riĉajn bienistojn, komercistojn, ekleziulojn kaj ceterajn gravulojn de la ĉefaj urboj el Rio-de-Janejro, San-Paŭlio kaj Minas-Ĝerajso. Petro tion faras, ĉiam bone akceptita de la popolo, kaj dum tiuj vojaĝoj regis kaj administris la landon lia edzino, Leopoldino. La fakta unua reganto de la naskiĝanta lando estis virino. Ŝi estris la administrajn kunvenojn kaj kune kun Bonifácio, faris gravajn decidojn. La lando

bolis de konspiroj tiutempe. Brazilo definitive rompis la ligan al Portugalio, kiam ties ĉi kortego deklaris Don Petron kaj liajn ministrojn ribeluloj kaj iniciatis preparadon por militista atako al la eksa kolonio. Tiam, dum unu el tiuj vojaĝoj, en la 7-a de Septembro 1822, Petro ricevis leterojn de Leopoldino kaj de Bonifácio, kiuj instigis lin fine decidi por la senrevena sendependiĝo.

La milito por la sendependiĝo estis longa kaj ĝena. Ĝi okazis ĉefe en du frontoj. En la sudo, la portugaloj rezistis pli ol unu jaron. En la nordo kaj nordoriento, pro la malfacila komunikado kun la ĉefurbo kaj granda kvanto da portugaloj komercistoj, multaj urboj deklaris fidelecon al la eŭropa kortego. La bataloj daŭris 21 monatojn, kaj la nombro da luktantoj estis pli granda ol tiu de la sendependiĝo de aliaj landoj de Sudameriko samepoke. En Bahio, ekzemple, pli ol 16000 brazilanoj kaj ĉirkaŭ 5000 portugaloj batalis dum unu jaro kaj kvar monatoj. Salvadoro, la unua ĉefurbo de Brazilo, estis elektita de la portugaloj kiel strategia punkto por rezistado por de tie rekonkeri la ribeliĝajn provincojn. Nur post la venko de la brazilanoj tie, en Julio 1823, la sendependiĝo estis agnoskita.

Tiel komenciĝis juna lando. Ĝia nova flago prenas la kolorojn verdan, de la dinastio Bragança, kaj flavan, tiun de la familio de Leopoldino. Jozefo Bonifácio havis siamense klaran planon por tiu nova lando. Por li, estis grave ke la civitanoj unuigu ĉirkaŭ la persono de konstitucia reĝo, Don Petro. Li strebis al la unuiĝo kaj teritoria tuteco de Brazilo, ke ĝi ne sendependiĝu same kiel la hispana Ameriko, kiu dispeciĝis en multaj malfortaj landoj. Li estis tre singarda kontraŭ la troigoj okazintaj en Francio dum la Revolucio, kiun li vidis propraokule. Li defendis la katekizadon kaj civilizadon de la indiĝenoj, la transformiĝadon de la sklavoj en "civitanojn aktivajn kaj virtajn", kaj planis agraran reformon kiu anstataŭigosu neproduktivajn lati-

fundiojn per malgrandaj familiaj bienoj. Lia plano antaŭvidis senpagan elementan instruadon por ĉiuj, kaj la kreadon de "almenaŭ unu universitato" por instruado de medicino, naturaj sciencoj, juro kaj ekonomio.

Bonifácio estis larĝavida. Surprize li defendadis translokiĝon de la ĉefurbo al la centro de la lando cele al la nacia integriĝo, io kio okazis nur post unu jarcento kaj duono. Li konsideris virta la interesan mikسادon, tipe brazilan socian trajton. Longe antaŭ Gilberto Freyre, li skribis ke "la mulato devas esti la raso plej aktiva kaj entreprenema, ĉar kunigas la impetan vivecon kaj fortikecon de la negro kun la moviĝemo kaj la sentebleco de la eŭropano". Liaj ideoj pri la fino de sklaveco ankaŭ estis tre fruaj. Tio estis nepensebla en Brazilo dum la komenco de la 19-a jarcento, ĉar la ekonomio de la lando ege dependadis de la forto de la sklavoj. "La negroj estas homoj kiaj ni", li asertadis. Tiaj ideoj, interalie, kaŭzis lian politikan pereon unu jaron poste.

Petro, nun imperiestro Don Petro la Unua, fariĝis monarko ordonema, sed liveris al Brazilo unu el la konstituciojn plej liberalajn ende sia tempoepoko kaj ĝis hodiaŭ la plej longdaŭra en la historio de la lando: 65 jarojn. Kiam li mortis, en 1834, 36-jara, li postlasis du heredulojn en la du flankoj de Atlantiko. La pli aĝa filino de Leopoldino, Maria da Glória, estis kronita en Portugalio; kaj ŝia dua filo, Petro de Alcântara, entroniĝos en 1841 en Brazilo kiel Don Petro la Dua. Antaŭ ol morti, Petro nomumis Bonifácion respondeculo por la edukado de siaj gefiloj, inter ili, la estonta Petro la Dua. Leopoldino estis forlasita de sia edzo favore al brazilano, kiun li konis dum la alprovincaj vojaĝadoj. La princino mortis dum aborto en la naŭa gravediĝo, sola kaj depriemiĝinta, unu monaton antaŭ ol fariĝi 30-jara. ■

Plena(kaj Nepra) Gramatiko de Esperanto

Fernando Pita

Unu el la plej gravaj demandoj, kiuj intervenas en la instruado de nia lingvo, estas tiu iam nomita de Sylla Chaves kiel “funeliĝo de la instrumentadoj”. Tio estas: abundo de porkomencantaj lerniloj, sekvi-ta de terura manko de materialoj por progresantoj kaj progresintoj.

Sed al tiu klasigo oni povas aldoni alian: La unuaj ĝenerale estas nacilingvaj kaj prezentas al la lernantoj ĝeneralan bildon pri tio, kio estas Esperanto, ĝia funkciado ktp. La duaj, kontraŭe, estas plene esperantlingvaj. Ili kutime celas internacian legantaron kaj ne sin detenas en pli specifaj problemoj, komunaj inter tiuj, kiuj komencas progresi.



Tiu situacio, ekzemple, klarigas kial libro jam pli ol 60-jara, kia Esperanto sem Mestre, kies lasta papera reeldono okazis en 1987, estas ankoraŭ rigardata kiel “la plej bona lernilo por portugallingvanoj”. Kvankam tre for de la aktualaj lingvistikaj teorioj por lernado de lingvoj, kaj kvankam tiu gramatika terminologio ne plu estas uzata por la portugala lingvo,

tiu libro ankoraŭ estas la “nesuerebla” paradigmo de l’ instruado de Esperanto al brazilanoj.

Tamen, eĉ la plejmulto el tiuj, kiuj rekomendas tiun libron por (mem)lernado de nia lingvo, laŭvide forgesas, ke ĝi ne estas gramatiko, sed nura metodo. Ne rimarkinte tion, ili same ne perceptas, ke tiuj specoj de libroj havas malsimilajn funkciojn.

La rolo de gramatiko estas fariĝi “leĝdona kodo” pri la lingvo. Ĝi celas distingi la ĝustajn disde la malĝustaj formoj kaj prezenti la plej taŭgajn uzojn de esprimivaj rimedoj de ĉiu lingvo. Siavice, metodoj celas instrui la lingvon tia, kia ĝi estas uzata. Tial, en lingvometodoj oni eĉ povas instrui uzojn kiuj estas laŭgramatike konsiderataj netaŭgaj aŭ neadekvataj, kondiĉe ke ili estu ĉies kaj ĉie uzataj en ĉiutaga vivo.

Plie, dum metodoj celas konduki lernanton ĝis iu antaŭfiksita punkto: baza, daŭriga, ktp., gramatikoj devas prezenti al konsultanto la tutan, ampleksan fotografion de la lingvo, senkonsidere ĉu tiu konsultanto kapablas kompreni ĉion, kion ĝi enhavas.

Jen konkretaj ekzemploj: en la metoda flanko, la jam citita Esperanto sem Mestre, kaj, aliflanke, eminentaj gramatikoj kiaj PMEG, de Bertilo Wennergren; PAG, de Kalocsay kaj Waringhien - certe ne rekomendataj por novlernantoj, ĉar krom la fakto ke ili estas verkita en Esperanto, ili same postulas de ĉiu konsultanto pli ol meza konado de gramatika teorio. Inter tiuj du grupoj, eta grupo de libroj verkita speciale por progresantoj: Vojaĝo en Esperanto-Lando, de Boris Kolker; La tuta Esperanto, de Henrik Seppik kaj Paŝoj al Plena

Posedo, de William Auld, estas tri verkoj internacie rekonataj kiel instruiloj por progresantoj.

Tamen, kaj jen la kerna demando, kialo de ĉi tiu teksto: Kiun gramatikon ni povas uzi, kune kun tiuj verkoj? Certe oni ne povos uzi tiujn supre menciitajn, ĉar ili estas ja tro “pezaj” por novuloj; kaj, kiel dirite, ili ne celas la specifecon de tiuj kiuj ankoraŭ alfrontas eĥojn de siaj naciaj lingvoj en lernado de Esperanto: sume, tio implicas, ke tiu gramatiko devus, do, esti kaj por progresantoj kaj nacilingva. Tiu lasta kriterio malpermesas kreadon de gramatiko internacia, kiaj la jam menciitaj. Ĝi maksimume rolos kiel gramatiko komuna al lingva teritorio, internacia aŭ ne, kaj tio signifas ke en Esperantujo estas spaco por amaso da tiuj gramatikoj.

Ĉu do iu portugallingvano devos verki tiun gramatikon? Tute ne, simple ĉar ĝi jam delonge ekzistas! Temas pri la Gramática Completa do Esperanto, verkita de Geraldo Mattos kaj unuafoje eldonita en 1987 - ties dua eldono estas el 2002. Fakte, la plej surpriziga afero pri tiu verketo estas kiom profunde la brazila esperantistaro forgesas ĝin.

Gramática Completa do Esperanto estas la kronjuvelo en la lingvistika verkaro de Geraldo Mattos, ne ĉar li jam ne estis verkinta multajn bonegajn priesperantajn artikolojn en universitataj revuoj, nek ĉar li verkis pliajn bonegajn librojn - la kvin titoloj de la Lingva Kolekto tion pruvas; sed pro la utileco kaj taŭgeco de tiu libro al ĝenerala portugallingva esperantistaro, kiu delonge bezonis verkon tian, kiu, krom prezenti la lingvajn strukturojn, sin detenu sur la plej gravaj

problemoj rilataj al lernado de Esperanto fare de brazilanoj.

Unu el la plej interesaj ecoj de tiu gramatiko estas la fakto, ke Geraldo Mattos lerte fuĝas el tiu ĝenerala trajto kiu koncernas ĉiun “veran” lingviston: ĉiuj suferas pri “nomenklatura manio”, tio estas, manio krei novajn terminologiojn por jam delonge konataj lingvaj fenomenoj (se vi dubas, bonan ekzemplon vi trovos en PMEG, kie svarmas o-vorto, vorteto, vortero ktp., anstataŭ substantivo, konjunkcio kaj sufikso). Tial, Geraldo uzas en sia Gramática la saman terminologion oficialan por la portugala, kio vere faciligas al leganto scii pri kio fakte temas. Kompreneble li ankaŭ prezentas novajn vortojn, kiam temas pri fenomenoj neekzistantaj en la portugala.

Unu el la trafikaj kvalitoj de tiu verko estas la larĝa spaco dediĉita al esperanta sintakso: ĝenerale reduktita al “instruado de akuzativo”, jen ekzemplo de temo, kiun aliaj verkoj sisteme flankenlasas. Kontraŭe, el la kvin ĉapitroj de la Gramática, tri estas dediĉitaj al tiu tre grava parto de la lingvo. Ĉikaze la ĉapitroj 3 (Construção do período) kaj 4 (Processamento sintático) estas gravegaj temoj, kiuj ĉiam povas konfuzi portugallingvajn progresantojn, kaj pri kiuj aliaj verkoj ne pritraktas.

Alia rimarkinda karaktero de tiu libro estas ĝia kuraĝo menciigi ne nur la lingvon, sed ankaŭ debati temojn pri kiuj estas ankoraŭ ia

kverelo inter esperantistoj: ekzemple, ĝi mencias la tielnomatan atan/itan demandon, la pronomo “iŝi”, kaj aliaj aferetoj, kiuj, kvankam ne taksitaj kiel ĝustaj, ja ekzistas en la lingvo, kaj devas esti konataj de la lernanto, eĉ se nur por scii, ke ili estas evitendaj.

Tamen, oni ne povas ne paroli pri tio, kion multaj certe taksas kiel problemon en la verko: en ĝi ne estas ekzercoj. Sed oni komprenu, ke tiu manko ŝuldiĝas ĝuste al la celo diferencigi ĝin disde lingvolerniloj, kiel ekzemple Aktuala Metodo de Esperanto, ankaŭ verkita de Geraldo Mattos. AME certagrade funkcias kiel ekzercaro por la gramatiko. Plie, oni ne forgesu, ke gramatikoj, same kiel vortaroj, estas preferinde konsultlibroj. Malgraŭ tio, ke ili povas estis tiele uzataj, ili ne estis verkitaj, tamen, cele al tio, - fariĝi ĉiutagaj instruiloj.

Restas ankoraŭ demando: “Se tiu gramatiko estas tiel bona, kial la plejmulto de la brazilanoj ne konas nek uzas ĝin?” Respondoj estas ja diversaj. Unue, Geraldo Mattos estis ĉiam tre superŝutita de laboro, kaj kiel universitata profesoro kaj kiel ano kaj poste prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj li ne havis tempon por disvastigi siajn proprajn librojn. Due, bedaŭrinde multaj brazilaj esperantistoj kontentigas sin per baza kurso, kaj tiel ne investas tempon kaj energion progresante, sekve ili ne bezonas tiun verkon. Trie, la alveno kaj populariĝo de interreto kaj sociaj re-

tumoj faciligis kontakton kun pli lertaj esperantistoj, kio intensigis la lernadon sen nepra neceso de libroj.

Kaj ĝuste pro tiu lasta kialo, verkoj kiaj Gramática Completa do Esperanto fariĝas hodiaŭ eĉ pli necesaj ol antaŭe; ĉar kune kun interreto ekaperis ankaŭ la “interretaj eminentuloj”: homoj kiuj disheroldas, al multaj ekprogresantaj lernantoj, ne Esperanton mem, sed Esperanton tian, kia ĝi devus esti, laŭ iliaj propraj vidpunktoj. Tiu estas ja minaco pli grava al nia lingvo ol, ekzemple, antaŭeniĝo de la angla, aŭ io simila; sed almenaŭ kuraciloj ekzistas, kaj tiu gramatiko de Geraldo Mattos estas unu el ili. ■



Pliriĉigu Vian Vortprovizon

1) abrazi/i

- A. Ĉirkaŭigi per ambaŭ brakoj kun samtempa amema premo al la ĉirkaŭigata objekto aŭ persono.
- B. Frot-eluzi.
- C. Bruligi.

2) dir/i

- A. Irigi iun kun si al iu loko.
- B. Uzi lingvon.
- C. Konigi sian penson per vortoj.

3) envi/o

- A. Sento de tiu, kiu deziras havi tion, kion alia posedas.
- B. Meto sur la ĝustan vojon.
- C. Ago de tiu, kiu irigas ion aŭ iun ien.

4) fe/o

- A. Malbelulo.
- B. Kredo bazita sur religio.
- C. Fabela homforma estaĵo kun magia povo.

5) gard/i

- A. Atenti, por eviti danĝeron.
- B. Zorgi, ke io ne perdiĝu.
- C. Direkti sian vidon sur ion.

6) lam/a

- A. Malpura, havanta aŭ haviganta koton.
- B. Malfacile paŝanta pro kripleco de kruro aŭ piedo.
- C. Rilata al altranga religia instruisto en Tibetdevena budhismo.

7) lambd/o

- A. Lasciva lekado.
- B. Besto el familio de kameletoj vivanta en Sud-Ameriko.
- C. Greka litero.

8) ordinar/a

- A. Ne diferenca de la kutimo.
- B. Maldelikata, malplaĉa, barbara.
- C. Orde aranĝita.

9) rob/o

- A. Alproprigo de fremda posedaĵo.
- B. Vesto kovranta la korpon de brusto ĝis gamboj.
- C. Aŭtomato kapabla plenumi laboron.

10) tir/o

- A. Ago de io aŭ iu tiranta.
- B. Ĵeto celanta vundi aŭ mortigi.
- C. Demeto de io.

Respondoj

1) abrazi/i

B. Frot-eluzi, skrap-eluzi.

Ni iru, ni iru! – li rediris kun malklara voĉo kaj piednuda ekmarŝis laŭ la abraziita ŝtonaro.

E. Kumičić, trad. S. Rukelj: Surprizitaj nuptofestantoj, inko, 2001.

2) dir/i

C. Konigi sian penson aŭ senton per vortoj

“Pardonu al mi, patrino,” diris la malfeliĉa knabino.

L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Ekzerca-ro, § 17

3) envi/o

A. Sento de tiu, kiu deziras havi tion, kion alia posedas.

Feliĉo kaj riĉo envion elvokas.

L.L. Zamenhof: Proverbaro Esperanta, § 413

4) fe/o

C. Fabela homforma estaĵo kun magia povo.

La mastrino sur fenikso kaj la mastro kun pafarko sur drako, akompanate de feoj kaj feinoj, flugas sur la ĉielo inter nuboj.

CHEN Ji - Ĉinaj freskoj. Artikolo aperinta en Kontakto n-ro 243 (2011:3) p. 17

5) gard/i

A. Atenti, zorgi por eviti al iu aŭ io minacantan danĝeron aŭ eblan malbonon.

Gardu min kiel la pupilon de la okulo.

L. L. Zamenhof: La Malnova Testamento, Psalmaro 17:8

6) lam/a

B. Malfacile paŝanta pro kripleco de kruro aŭ piedo.

Kaj li estis lama je siaj ambaŭ piedoj.

L. L. Zamenhof: La Malnova Testamento, II. Samuel 9:13.

7) lambd/o

C. La dek-unua litero de la greka alfabeto (Λ, λ).

Por solvi (diferencialan ekvacion), unue trovu la valoron de lambdo.

Barry Friedman: Pri diferencialaj ekvacioj. Artikolo aperinta en Usona Esperantisto, Bulteno de Esperanto-USA, n-ro 2013:3.

8) ordinar/a

A: Ne diferenca de la kutimo, nek de la plimulto el la okazoj.

[...] mi forĵetis ĉiujn miajn ordinarajn okupojn.

W. Shakespeare, trad. L.L. Zamenhof: Hamleto: reĝido de Danujo, 1893. Eldonita en Nurnbergo, 1894.

9) rob/o

B. Longa ampleksa flirtanta vesto kovranta la korpon de la brusto ĝis la gamboj.

Mi vidas min, kia mi tiam estis, kun la longaj ruĝaj harplektaĵoj, la flikita robo kaj la nudaj kruroj sunbrunaj.

Anna Löwenstein. La ŝtona urbo. Antverpeno : Flandra Esperanto-Ligo, 1999.

10) tir/o


A. Ago de io aŭ iu tiranta aŭ trenanta.

De mia kolo la vestaĵon mi ŝiris per unu tiro.

Sándor Szathmári. Vojaĝo al Kazohinio. Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 1998.

Dudek Jarojn Sen Fernando Marinho

Hilmar Ilton Santana Ferreira



- Bonan tagon!
- Bonan tagon, kiel vi fartas?
- Bonete, laŭ la eblo permesata de tiu militisma sistemo, kiu regas nin.

- Plezuron. Mi estas Fernando Marinho, prezidanto de BEL kaj emerita kolonelo de Brazila Armeo.
- Ops!

Tiam Brazilo ankoraŭ restis sub militista registaro, sed tia estis la enkonduko al dialogo en 1985 inter mi, esperantisto de la landinterno, kaj la mezaĝa sinjoro staranta malantaŭ vendotablo de la sidejo de BEL (Brazila Esperanto-Ligo) en la multjara domo de IBGE en Rio-de-Ĵaneiro. Tiu estis Fernando Marinho, deĵoranta kiel prezidanto de nia nacia Ligo. BEL tiam ne longe fariĝos centjaraĝa, ĉar ĝi estis fondita en 1907. Post solvado de kelkaj problemetoj ĉe la plej grava kaj elstara esperanta institucio en Brazilo, ni iris tagmanĝi ĉe Fernando, pro lia afabla invito. Tiel mi konis parton de lia familio, nome lian edzinon kaj unu el liaj gefiloj. Mi memoras, ke tiu ĉi en tiu tago estis tre okupata pri la uzo de tiutempe plej moderna komputilo - sed produktita en Brazilo pro tiama speciala komerca protekteleĝaro.

Ekde tiam ĝis ĉiam Fernando fariĝis unu el niaj plej admirataj homoj, kiu bone laboris por la afero de Zamenhof, kaj li mem senegale ĝentila, nobla kaj efika homo.

Fernando prezidis BEL (1982-

1985) kiam ĝi ankoraŭ sidejis en Rio-de-Ĵaneiro. Ekzistis samtempe du aliaj naciaj organizoj, nome Brazila Konsilantaro de Esperanto (BKE) kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE). Fernando Marinho laboris sukcesplene por ilia unuiĝo. Iĝinte prezidanto de BEL kaj BKE, li faris denove unusola la precipan nacian esperantan organizon. Tio estas: denove ununura tutnacia institucio nomata BEL iĝis la landa organizo ĉe UEA.

Fernando forpasis en la 10-a de Februaro 2011. La sekvan tagon aperis tiu ĉi mesaĝo de samideano Pedro Cavalheiro en la diskutlisto Veki: "Marinho estis unu el tiuj silentaj laborantoj, kiuj multe pli faris ol anoncis. Marinho estis bonega animo kaj bonega amiko. Kiam mi prezidis la Ligon kaj travivis kelkajn pezajn tempojn, ĝuste dum la plej malfacilaj horoj mesaĝoj de Marinho simple ekaperis en mia mesaĝilo por komforti kaj apogi min. Li estis kiel la feoj de infanaj rakontoj, kiuj aperas en la plej krizaj momentoj por lumigi la vivon. Li neniam, neniel, ion ajn petis de mi, sed ĉiam sintenis donaceme kaj diskrete."

Inter la laboroj de Marinho menciindas: Blogo 'Esperanto Fora da Toca'; Projeto Sementeira (Projeto Semado), por disvastigi Esperanton en lernejoj; kompilado de la libro 'Não só Idealistas mas Realizadores' (Ne nur Idealistoj sed Re-

aligantoj), Eldonejo Liney, 1995.

Intervjuate de la gazeto Rio Esperantisto en 1989 pri la stato de la movado, tion asertis Fernando:

"Ŝajnas al mi, ke la movado iras senĉese antaŭen. Dum kelkaj periodoj ĝi iras malrapide, dum aliaj tempospacoj ĝi iras pli rapide. Tamen, ĉiam antaŭen! Kelkfoje mi opinias, ke la situacio stagnas, sed fakte ni ne havas sufiĉajn informojn por prave konjekti pri la vera situacio. Kompreneble, nia movado ankoraŭ ne atingis la sopiratan stacion. Nek en la mondo, nek en nia lando. Pro tio oni multe suferas. Se oni ne bone kontrolas sian frustracion, oni fariĝas agresema, senpacienca, tro kritikema kaj tiel plu. Furioziĝi estas danĝere. Prudentiĝi estas preferinde. Jes, mi havas proponon: ni fojfoje relegu la saĝajn konsilojn, kiujn Zamenhof disvastigis pere de sia verkaro. Estas de li, ekzemple, la jenaj frazoj: "Ne malĝoju tial, Esperantistoj, se nesaĝaj homoj ironie rimarkas al vi, ke vi estas ankoraŭ tre malmultaj, ne perdu la kuraĝon, se via afero iras malrapide. La afero konsistas ne en rapideco, sed en certeco. Multe da sencelaj aferoj ekbrilis antaŭ la mondo rapide, sed ankaŭ rapide falis; afero bona kaj certa progresas ordinare malrapide kaj kun grandaj malhelpoj." ■





Querino Neto estas studento pri Juro. Li esperantistiĝis 14-jaraĝe. Baldaŭ li finos sian duan prezidantecon de BEJO kaj pretas rakonti al BE, interalie, kelkajn atingojn de tiuj du estrarperiodoj.

1. Kiam vi membriĝis en BEJO?

Mi eniris en 2016, en mia 18-jareco, kiel vickontrolkonsilanto elektita dum la brazila E-kongreso en Manaus/AM. Tien mi iris subvenciite de BEJO, ĉar mi partoprenis en la konkurso BEJO-Ataŝeo. Mi atingis la duan rangon, kaj la venkinto estis Lucas Barbosa, kies nomo nuntempe titolas tiun konkurson.

Post kelkaj monatoj eksiĝis sekretario de BEJO kaj oni provizore nomumis min por la posteno, en kiu mi oficialiĝis en 2017, sed jam kiel ĝenerala-sekretario. Tiam mi organizis kandidataron kaj en 2018, kun rekorda nombro da junuloj en asembleo (ĉirkaŭ 60), mi elektiĝis prezidanto. En 2020, sub virtuala asembleo, oni min reelektis.

2. Kiujn ŝanĝojn vi rimarkas dum tiuj du estraraj periodoj?

Ekzistas multaj kernaj ŝanĝoj. La ĉefa el ili estas la fakto, ke BEJO fariĝis la alirejo al la esperantista komunumo, kulturo kaj movado por la junaj komencantoj. Ĝis ne longe antaŭe la junularo vadis relative solulan vojon ĝis la renkontiĝo kun BEJO. Nuntempe, antaŭ ol komenci elementan lernadon, ili jam partoprenas niajn komunikajn kanalojn kaj niajn virtualajn eventojn.

Dum miaj du administradoj tio havis prioritaton pro la pligrandiĝo

de la nombro de junuloj venintaj el la brazila versio de Duolingo. Menciindas, ke la konstruado de tiu versio havis aktivan partoprenon de junuloj de BEJO, inkluzive de la estrado de nia vicprezidanto. Tiuj junuloj, inter ili mi mem, kaj elstare Marcionilo Vasconcelos, kontrolkonsilanto de BEJO, ricevis rekompencan premion de Duolingo.

3. Kiel BEJO agis favore al tiuj novuloj?

Necesis restrukturi la administradon por bone ilin akcepti. Ni direktis la atenton al la sociaj retoj, por plibonigi la atingojn de BEJO en ili - ke ĝi estu pli alirebla kaj ĉefe pli profesieca. Por tio, ni investis en retadministradon, tiel ke BEJO, inter esperantistaj institucioj, havas unu el la plej sekvataj kontoj ĉe Instagram, Facebook kaj Youtube.

Krome, ni priesploris novajn administremulojn: inter la brazilaj junuloj, BEJO fariĝas lernejo pri institucia administrado. Ĝi disponigos bonegajn estrojn al BEL, TEJO kaj UEA.

4. Kial vi pensas tiel?

Ĉar ni distribuadis ĉiujn taskojn. Antaŭ ol nia administrado, nur kvar estraranoj faris la tutan nacian taskaron. Nia strukturo nun estas pli ol 400% pli vasta ol antaŭe. Ni duobligis la nombron da estraranoj. Nuntempe ekzistas tri sekretariejoj: Organizado, Dokumentado, Dokumentado kaj Membrado. La unua zorgas pri mikrostrukturoj, kiel komisionoj kaj landeraj sekcioj; la dua, pri korespondado kaj raportoj; la tria, pri rilato inter la institucio kaj la unuopaj anoj.

Ni efektivigis profesinivelan ag-

manieron per analiza metodo pri administra kvalito nomata Ekvilibra Indico pri Rendimento (angle: BSC, Balanced Scorecard), kiu rigore mastrumis la plenumadon de niaj jaraj estraraj kunvenoj.

Aldone, ekzistas financa estrarano, kiu zorgas pri enspezoj, dum la kasisto traktas pri buĝetoj kaj elspezoj. Kaj fine, ĝenerala direktoro, kies respondeco estas taksi la rendimento de la teamo kaj zorgi pri ties bonstato.

Dum la dua periodo, ni fondis specialajn kunordigadojn: pri merkatumo kaj amas-komunikiloj, pri aŭdo-vido, pri redaktado, pri varbado, pri eventoj, pri subtekstado de videoj, pri eksteraj rilatoj, pri trejnado kaj asistado al la estraro. En ĉiu el tiuj fakoj agas malsama junulo, kaj tio estas gravega por ke pli da personoj proksimiĝu de la laboro de la estraro kaj fariĝu estontaj estraranoj. Temas pri maniero kultivi la institucian daŭripovon kaj garantii la ekzistadon de kapablaj homoj por daŭrigi la laboron hodiaŭan.

5. Kia estas la internacia agado de BEJO nuntempe?

BEJO atingis 101 membrojn, tial ni rajtis investi duan reprezentanton ĉe komitato A de TEJO. Nur tri landaj asocioj sukcesigis tion lasttempe. Rilate al Latinameriko, per la konkurso Lucas Barbosa, lasteladone en 2019, ni sendis la venkinton, Luana França, al Kolombio por deĵori dum tri monatoj ĉe Kolombia Ligo de Esperanto. En 2018, BEJO staris inter la 200 elektitaj Ne ŝtataj Organizo de Instituto Doar, fakto kiu estis rekonita de El Popola Ĉinio.

6. Profesie vi laboras kiel parlamenta asesoro pri juraj temoj. Sed ĉu estas konata via flankokupo rilata al retoriko?

Mi interesiĝis pri retoriko kaj parolarto danke al Esperanto, malgraŭ ke mi havis aliron al tio pro la studenta kurso. Kiam mi estis en UK Lisbono, en 2018, okazis parlamenta konkurso kiun mi spektis, sed al kiu mi ne konkuris. Pro la mencio al Ivo Lapenna, mi revenis al Brazilo kaj tuj komencis legi lian libron. Post tiam, mi eklegis aliajn aŭtorojn, kiel Aristotelo kaj Kvintiliano. Post dujara studado, en 2020 mi kreis projekton nome "Fale com Querino", en kiu mi instruetis

kelkajn aferojn pri argumentado kaj parolado. Tiam mi malfermis kursojn kaj havis ĉirkaŭ 120 lernantojn laŭlonge de ses monatoj.

7. Vi elposteniĝos en ĉi tiu jaro. Kion vi planas fari poste?

Mi enfokusigas mian nunan agadon al la fondiĝo de Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj, kiun mi kunordigas kune kun D-ro Miguel Faria de Bastos, prezidanto de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Espereble iam estos bonaj kondiĉoj por ke mi revenu al la estraro de Brazila Esperanto-Ligo, de kiu mi demisiis. Laŭ mi, indas preni la ekzemplon de la kresko de

BEJO kaj ripeti tiun sperton en BEL. Kompreneble ne nur el trafoj oni faras estraragadon, sed ankaŭ el eraroj, sed ju pli da sperto, des malpli da mispaŝoj. Post 6-jara agado en la supera instanco de BEJO, kiu donis al mi konon pri la funkciado de la brazila movado kaj de la situacio de la lokaj kluboj kaj asocioj, mi pensas, ke ajna estrara defio, eĉ se granda, ne estos teruriga. Sed tamen indas agadi laŭplane, konscie pri la fakto, ke solidaj ŝanĝoj naskiĝas milde, neniam abrupte, kaj la sekreto de bona mastrumado loĝas en la konstanteco kaj daŭripoveco de niaj nunaj agadoj. ■

NIA LITERATURA PANTEONO

Cícero Soares

Ferenc Szilágyi (1895) estis hungara verkisto, akademiano, ĉefredaktoro de la grava Norda Prismo kaj mastro de vasta beletra kontribuo al la esperantista kulturo.

Kiel poeto, li situas en tiu loko, nomita de William Auld kiel polurita romantismo, kiam, post impona inaŭguro de Kalocsay, "la infanaĝo de nia poezio definitive forpasis". Szilágyi debutis en 1934, ene de la kolekto Dekdu Poetoj, kaj, dediĉinte sian eminentan talenton al la prozo, li lasis sian poezian stilon tra ĉiuj rakontoj multvolumaj.

La spegulfiguro (Ferenc Szilágyi)

Mi timeme tiras min al ŝima muro,
Sed estas alta, forta
La spegulfiguro.

Dum silentaj horoj, je vesperpurpuro
Severe min rigardas
La spegulfiguro.

Super mi altiĝas en juĝistveluro,
Disputas, juĝas, punas
La spegulfiguro.

Trans la teron paŝas treme mia kruro,
Teruras sur ĉiel' min
La spegulfiguro.

Ĉio plore ploras, vanis eĉ la kuro,
Ne havas korkompaton,
Preparas sabroton
Mil jarojn atendas super mi, tremanta mi,
La spegulfiguro.

O senhor no espelho

Tradukis: Cícero Soares

Tímido em parede suja me esguelho,
Mas é mui alto, forte
O senhor no espelho.

Em caladas horas de arrebol vermelho
Severo me espreita
O senhor no espelho.

Sobre mim assoma em vestes de um velho
Disputa, julga, pune
O senhor no espelho.

Para além da terra ando de Joelho
Do céu me intimida
O senhor no espelho.

Tudo chora em pranto, é vão qualquer conselho,
Cruzaa inominada
Prepara a punhalada
Por anos aguarda sobre mim, pobre de mim,
O senhor no espelho.

PROGRAMO MIA AMIKO



Unindo os interessados em aprender Esperanto com amigos esperantistas.

Programo Mia Amiko

Konstruante la estontan esperantistaron.

Adonis Saliba

Kio estas la Programo MIA AMIKO?

Simple dirante, ni estas interreta Esperanta komunumo. Ni estas parto de la centjara Brazila Esperanto-Ligo, kiu kunordigas la Esperanto-movadon en Brazilo. Programo Mia Amiko estas bonvena al tiuj, kiuj interesiĝas pri lernado de Esperanto, nia internacia lingvo, kaj tiamaniere ni helpas la interesatojn iĝi esperantistoj.

Esperanto unuigas nin tutmonde. Esperanto, krom esti neŭtrala internacia lingvo, estas multkultura ponto; ĝi estas unika sperto por vivadi en mondo sen limoj. Fariĝi esperantisto signifas esti parolanto de Esperanto kaj ankaŭ volontuli por ĝia disvastigo kaj instruado. Esperantistoj aktive partoprenas en la tutmonda Esperanto-movado, kie okazas multaj intelektaj, pacaj, integriĝaj agadoj, kiuj povas esti tre amuzaj kaj ĝojigaj pro ilia amikeca karaktero. Turismo, ekzemple, estas unu el la plej interesaj agadoj de la esperantistaro, sed instruado kaj diskonigado de nia lingvo estas alia tre interesa volontula kampo por helpi formiĝon de amikecaj grupoj. Travivi Esperanton alportas pli da koloroj al nia vivo. Krome, esperantistoj amikiĝas en la kvar anguloj de la mondo. Tial, ni fariĝas multkulturaj, veraj civitanoj de la mondo.

Ni devas memori, ke Esperanto

estas vivanta lingvo; ĝi estis desegnita por esti internacia lingvo. Regula, preskaŭ senescepta lingvo kun simpligita gramatiko, tio helpas ĝian lernadon. Aldone, ekde kiam ni naskiĝis, Esperanto apartenas al ni, kiel ĝi apartenas al ĉiuj homoj. Tiu ĉi lingvo ne estas unukultura kaj ne dependigas nin de aliaj fremdaj naciaj kulturoj. Do, lerni Esperanton ne estas engluti kromajn fremdaĵojn de aliaj nacioj kaj senti sin kiel randuloj de alilandaj kulturoj. Kontraŭe, ni reakiras proprajn, kiu jam estas nia en internacia nivelo, kiel homoj vivantaj en tiu planedo. Surbaze de tiu “interna ideo” ni devas krei nian etoson por lernado de la lingvo. Kaj tiu lernado devas veni kune kun la sento de “aparteneco” al tiu mondskala kulturo.

Programo MIA AMIKO (PMA) kunigas interesatojn kiuj volas lerni Esperanton kun jam formitaj esperantistoj en amikeca kaj integriĝa medio. En la pli-ol-jarcenta kulturo, Esperantujo estis konstruita surbaze de amikeco inter la esperanto-parolantoj. Konsekvence, tiu lingva komunumo uniĝis por batali favore al paco, tolerema kunvivado kaj respekto al aliaj homoj, kiuj daŭre kreskis en intelekta kapablo. La grava verkovervo de la esperantistaro, kiu ĉiam ekzistis en la movado, devenis de la neceso provizi distron kaj ĝojon al la konsumanta

esperantistaro.

Nuntempe, Programo Mia Amiko fariĝis granda komunumo de amikoj en la virtuala mondo. Ni konsistas el komunumaj virtualaj ĉeloj, kiujn ni nomas AKE (Amikeca Komunumo de Esperanto). Ĉiu AKE estas hejmo de esperantistaj amikoj en vacapaj grupoj, kiuj regule kunvenas por studi Esperanton kaj interrilati en la Esperanta kunteksto. El tiuj grupoj originas niaj Esperanto-volontuloj, kiuj helpas nin disvastigi kaj daŭre instrui Esperanton kaj, en pozitivaj cikloj, produkti pli da AKE-ĉeloj kaj tiel daŭrigi la procezon.

Amplekse parolante, la tuta PMA estas bonega interreta anaro por helpi la komencantojn ne nur lerni Esperanton, sed ankaŭ por helpi ilin fariĝi esperantistoj. Ĝenerala filozofio pri la movado, ni pasas al niaj enregistritoj, kiu celas konstrui pli bonan mondon, pli kompren-povan kaj respektaman al ĉiuj kulturoj sur la Tero. Ĉiam, la Esperanto-movado estas formita de homoj kun tia internaciisma menso, kiuj pensas preter ajnaj teritorioj, regionoj kaj urboj. Ni pensas pri nia planedo kiel tutaĵo. Tie sidas niaj bazaj argumentoj por instigi la homojn fariĝi esperantistoj.

Krome, nia kurso estas senpaga. Nenia burokratio aŭ misgvidaj monaj postuloj detenas nin de nia ĉefa celo. BEL, kiel institucio,

prizorgas niajn monajn necesajojn, pro tio ni petas donacojn al nia konto de BEL.

Niaj Esperanto-kursoj, de PMA, estas faritaj virtuale per poŝtelefonoj, tabulkomputiloj kaj ĝeneralaj komputiloj, en virtualaj ĉambroj aŭ ene de la vacapaj grupoj. Tiel, la lernantoj povas komunikiĝi rekte kun siaj Esperantaj monitoroj kaj esperantistaj amikoj. Nenio el tio estus eblas, se ni ne havus la sociajn mediojn kaj elektronikan amaskomunikilaron. Ĉio ĉi estas tre moderna kaj lum-konektitaj sistemoj. Esperanto meritas tiun rapidegan spacveturon.

Progresoj de PMA

En la 15a de Decembro, 2011, Programo Mia Amiko estis fondita de Adonis Saliba kiu diskonigis en la retoj, pere de retmesaĝoj kaj anoncanta en kelkaj senpagaj paĝoj, ke li instruas Esperanton al interesiĝantoj per interreta medio. Kelkaj veteranaj volontuloj, helpe al Adonis, eniris en tiu reta instruado kadre de la ekanta PMA, surbaze de retmesaĝoj. La tiama uzata bona Esperanto-metodo KAPE, programo ellaborita de Carlos Pereira, kiu longdaŭre ekzistas, estis dum multaj jaroj la bazo por instruado. De 2011 ĝis 2017, la sistemo ne multe ŝanĝiĝis, tamen la vid-al-vida teknologio plilarĝiĝis kaj komencis fariĝi pli disponebla al la ĝenerala publiko, ĉefe per saĝfono. Tiu estis la momento, kiam ni spertis plian ŝanĝon, uzante aliajn metodojn rete bazitajn, kiel La Teorio Nakamura de Lernu.net kaj adaptita metodo de Stano Marĉek. Aperis finfine la metodo Duolingo, kiu multe helpis la diskonigon de Esperanto, sed ne la formiĝon de esperantistoj. Pro Duolingo, multaj komencis aperi ĉe nia sojlo. La jaroj pasis kaj en la fino de 2019 ni definitive ŝanĝis al vid-al-vidaj sistemoj, uzante la virtualajn ĉambrojn de ZOOM kaj MEET. Ekestis la pandemio dum 2020,

2021 ĝis la nuna momento. PMA furoris pro interesatoj. De 2011 ĝis 2019, dum 8 jaroj, ni ne havis pli ol mil interesiĝantoj. De 2020 ĝis hodiaŭ tiu nombro treege kreskis al pli ol 1500 homoj. Ni havas ĉirkaŭ 2-3 homojn ĉiutage en Brazilo, kiuj eniras tage en nian programon. Kaj alia pli impresa rezulto estas ke ili restas multe pli longe en niaj AKE-komunumoj kaj multe pli intense lernas la lingvon. Ni nuntempe havas ĉirkaŭ 20 monitorojn, kiuj instruas en la virtualaj ĉambroj. Tage kaj vespere, dum ĉiuj semajnaj tagoj ni havas lecionojn, kunvenojn, kunvenetojn kaj multmesaĝan interrilatadon de lernantoj inter si kaj kun la monitoroj. Ni disponigas diversajn metodojn ĉe PMA por lernigi la homojn, krom uzi la rete disponeblajn de Lernu kaj Duolingo. Do, ni havas interesan kaj riĉohavan komunumon kiu multe studas, travivas kulturon kaj travivas Esperantujon en sia plej larĝa amplekso.

Krom la simplaj instruaj eventoj, kie la monitoroj agadas, ni havas plie movadumajn eventojn, kiuj kontribuas profunde al la internacia esperantistigo de niaj partoprenantoj. Ni havas ekzemple "Dimanĉoj kun Danielo", kie nia argentina kaj dediĉa monitoro Daniel Cotarelo provizas internaciajn eventojn, kiuj estas multkulturaj kaj buntaj. Ni havis en 2021 "Parolu kun Manuela", zorgita de rumana famkonata Manuela Burghilea, kiu diligente distris kaj paroligis multajn el niaj esperantistoj de PMA. Ni daŭre havas la sesion de "Esperanta Literaturo" kun Prof-ro Fábio Fortes, kiu enkondukas altnivelan legadon de nia klasika literaturo. Tradukoj kun Prof-ro Paulo Nascentes estis altnivelaj sesioj por enkonduki tradukadon en nian programon. Ni ankaŭ havas komplementajn sesiojn de legado faratajn de André Tiago, kaj la leg-sesiojn kun ngela Faria por fortigi la prononcajn kapablojn de la

lernantoj. Multaj aliaj eventoj aperis dume: Muzikoj kun Anjo, Lecionoj por KER-Ekzameno, Paroligaj Sesioj, Spiritismaj Momentoj, ktp. Aldone, ni ĉiam insistas ke niaj ĵusbakitoj vizitu la riĉan internacian programaron de Eventa Servo kaj aŭskultu la interretajn radiojn de nia Esperantujo.

Tamen, oni devas mencii, ke dum pli ol unu jaro, okazis pli ol 30 eventoj de BRAKO/BRAKUMO. Tiuj eventoj estas interkulturaj kunvenoj por interrilatado kaj amikiĝo inter brazilanoj kaj koreoj. Tiuj eventoj estas la kristaliĝo de esperantismo en sia plej vasta reliefo. Geografie, Brazilo estas antipoda lando al Koreio. Ni havas tre malmultajn kontaktojn en fizika mondo, krom komercajn kaj diplomatiajn. Kulture ni vivigas apartajn memecojn, sed per Esperanto, ni vidas ke ni estas homoj kaj havas konigendajn kulturojn. Pli amikaj kaj tre kunigitaj ni fariĝis al niaj koreaj samideanoj. Ni ĝuas iliajn kantadojn, ilian ĝentilan kaj respekteman vivstilon. Kaj reciproke, ni ankaŭ montras nian Brazilon al ili. Ni malkovris, ke ili estas tiom spritaj kaj amikecaj kiel ni mem en Brazilo. Aliflanke, ni multe lernas de ili pri precizeco de la informoj kaj civitaneco. Fakte BRAKO/Brakumo estas sekvenda vojo por la esperantistaro tra la mondo.

Programo Mia Amiko estas ja tre bona vojo por generi pli da esperantistoj, ĉar ĝi ne nur reprezentas lernadon de Esperanto, sed ankaŭ manieron laŭ kiu oni instruas esti movadano kaj partopreni en tiu bela kaj vivoriĉa komunumo de Esperanto-Movado en la reto. ■

Mi Preferas Paroli el la Koro Memo

Leandro Abrahão



Iam oni demandis al Woodrow Wilson,, la prezidento de Usono de 1913 ĝis 1921, kiom da tempo li bezonas por prepari paroladon, pri kio li respondis: “Dependas de ĝia longeco. Se ĝi daŭros dek minutojn, mi bezonos ne malpli ol du semajnojn por prepari ĝin; se ĝi daŭros duonhoron, mi bezonos unu semajnon. Tamen, se mi rajtos paroladi tiel longe, kiel mi deziras, tiam mi ne bezonos ion ajn prepari. Mi jam estos preta.”

Tiu respondo de Wilson komprenigas, ke tempolimigo postulas koncizon. Ju malpli da tempo oni disponas, des pli granda estas la defio igi ĉiun vorton valori. Laŭ mia sperto, nepreparita parolado plej ordinare donas ne alian rezulton krom la jena: aŭ oni bedaŭras nediron de gravaj, aŭ diiron de malgravaj aferoj. Ne malofte oni demandas sin, “kiel mi povis ellasi tiun informon!”, aŭ “ve, kiel mi povis elbabilon tion!”

Nescio, kiel prepari sin, estas la plej ofta kaŭzo, kial oni ne preparas sin. Ĉu uzi komputilon, aŭ paperon? Kiun metodon uzi? Ekzistas ankoraŭ alia, multe pli klariga kaj profunda kaŭzo, nome rezisto.

La celo de parolado, prelego estas partodoni ideon, t.e. manieron rigardi la mondon... manieron, kiu favoras ne nur la preleganton, sed la vivon mem de la aŭskultantaro. Ĝi estas mensa bildo, bela kaj potenca (tiel ĝi ŝajnas al vi), kiu prezentiĝas tute klare kaj kolore. Tamen, ĝis vi trovos taŭgan manieron vortigi ĝin, ĝi restos ia bildo en via kapo, eĉ se klara kaj kolora.

Vortigo postulas racian strebadon trovi la taŭgajn vortojn por bildigo de la ideo al aliuloj. Tio estas,

kvazaŭ vi provus pentri pejzaĝon, kiun vi vidis dum vojaĝo. Jen instaliga rezistemo. Kial fari al si la penon meti ties vastecon en striktan kadron? Kial produkti ion, kio aspektus nekompleta, nefidela, eĉ disforma?

La ideon vi prezentu al vi ne kiel ion sendifektan, kion ne indas tuŝi, sed kiel krudaĵon. Tuŝi ĝin ne signifas deformi ĝin, sed forĝi ĝin. Metallo restas metalo post fando. Argilo restas argilo post knedo kaj bako en forno.

Preparo signifas la klopodon antaŭe vortigi vian ideon, t.e. la klopodo forĝi ion utilan el la ideo, kiun vi deziras diskonigi, ion utilan al la publiko, t.e. al la aŭskultantaro. Lufoje vi produktos kaj transdonos ion malgrandan, parteton de la tuto. Ja tro da lumo povas blindigi anstataŭ heligi, ĉu? Lufoje vi donos pli, multe pli.

Ne ĉiam vi povos prepari vin por prelegi, paroladi, sed ĉiam eblas paroli laŭ certa strukturo (sed tio estas alia temo). Oni nur ne diru “mi preferas paroli el la koro mem” por pravigi sian nescion aŭ rezistemon prepari sin. Viaj aŭskultantoj donas al vi tion, kion plej valoran ili havas: la propran tempon. Prepari sin signifas elmontri estimon pri io, kio estas unika kaj nereĝuebla. Kaj via kaj ilia tempo certe estas tia.

Tiu ĉi artikolo aperis modifite en uea.facila.org en julio 2020. ■

FRANCISCO MATTOS DE OLIVEIRA (1940 - 2022)

Francisco Mattos, ankaŭ tre konata kiel Ŝiko Mattos, naskiĝis la 9-an de Februaro 1940, en la municipo Palmo, ŝtato Minas-Ĵerajso. Li estis emerita bankoficisto.

Li komencis lerni Esperanton ĉe la Spiritisma Societo André Luiz, en Guar, Federa Distrikto, en 1973, kies baza kurso estis gvidata de Maria da Conceio Souza. Li instruis Esperanton en la sidejo de Brazila Spiritisma Federacio, de 1974 ĝis 1983. Tie Francisco kunfondis la “Grupon Ismael”, kies celo estis disvastigi Spiritismon per Esperanto.

Kiel bankoficisto li laboradis ĉe Banco de Crdito Real de Minas Gerais S.A, en Niterojo, ŝtato Rio-de-Ĵanejrio, de 1959 ĝis 1961. Poste li transloĝiĝis al la urbo Teofilo-Otono, MG, por profesii ĉe Banco do Brasil. Transloĝiĝinte al Braziljo, li fariĝis delegito de UEA.

Pro la demisio de Nia Lcia Souza el la estraro de BEL, la vicprezidanto Francisco Mattos de Oliveira fariĝis prezidanto de tiu institucio en la 7-a de Julio 1993. Li restis en la prezidanteco de BEL ĝis 1995. Dum sia prezidanteco, li subskribis la aĉetateston de la unua salono de BEL.

Li volontulis en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL) ekde 1986 kun kelkaj mallongaj interrompoj. Tiam li fondis la “perkorespondan kurson”, kiu havis pli ol mil gelernantojn.

La amata ĉevaleto de Ŝiko, tamen, estis la Libroservo de BEL. De la 31-a de Julio 1986 ĝis 1998 li ĝin administris. La Libroservo translokiĝis de Rio-de-Ĵanejro al Braziljo kun nur 39 titoloj, kaj Ŝiko faris ĝin la dua plej granda esperanta Esperanto-libroservo en la tuta mondo, kun preskaŭ 2 mil titoloj, kio faris ĝin pli malgranda nur ol tiu de UEA.

Li edziĝis al Maria Stella Alvim de Oliveira kaj ili havis tri gefilojn: Ludimilla, Rodrigo kaj Larissa. Bedaŭrinde okazis la forpaso de Maria Stella, kio estis granda bato por Francisco. Denove Francisco edziĝis, ĉifoje kun la esperantistino Ana Rosario Koide Kamey de Oliveira, naskiĝinta en la sudamerika lando Peruo.

Francisco Mattos forpasis la 28-an de Majo 2022, en Braziljo. Okaze de la funebra ceremonio, ĉeestantaj esperantistoj metis sur la ĉerkon la verdan flagon kaj kantis la himnon “La Espero”. ■




LINGVA LUDO

Nia Esperanta Proverbaro estas riĉa trezoro de esprimoj, parolturnoj kaj kulturo. Per ĝi oni povas facile lerni modelan sintakson kaj pligrandigi sian vortprovizon. Sube estas kelkaj proverboj pri la temo DEVENOJ. Kompletigu la mankantajn vortojn de ĉiu kaj ĝuu ilian saĝecon.

Vortmenuo: bastono - bovo - dento - doloro - gorgo - kastelo - malsano - nutra - okulo - paŝo - prudento - puno - rekomendo - rezulto - tero - zorgoj

De elekto tro multa plej malbona _____.
De fremda _____ ni doloron ne sentas.
De kantado senpaga doloras la _____.
De kiu la kulpo, por tiu la _____.
De l'koro spegulo estas la _____.
De la volo la ordono pli efikas ol _____.
De legado sen atento ne riĉiĝas la _____.
De majesta ĝis ridinda estas nur unu _____.
De malgranda kandelo forbrulis granda _____.
De peko kaj mizero estas plena la _____.
De plendo kaj ploro ne foriĝos _____.
De semo putra venas frukto ne _____.
De senripensa _____ venas ploro kaj plendo.
De tro da pano venas _____.
De unu _____ oni du felojn ne deŝiras.
De _____, ne de jaroj, blankiĝas la haroj.



Solvej:
1. rezulto 2. dento 3. gorgo 4. puno 5. okulo 6. bastono 7. prudento 8. paŝo 9. kastelo 10. tero
11. doloro 12. nutra 13. rekomendo 14. malsano 15. bovo 16. zorgoj

esperanto.org.br



Petro la 1-a de Brazilo aŭ Petro la 4-a de Portugalujo, (portugale Dom Pedro I en Brazilo aŭ Dom Pedro IV en Portugalujo) estis portugala reĝo kaj brazila imperiestro. Li naskiĝis la 12-an de oktobro 1798 en palaco Queluz, apud Lisbono. Li estis filo de la princo Johano de Portugalujo kaj princino Carlota Joaquina, filino de Karlo la 4-a de Hispanujo. Post alveno de portugala kortego al Rio-de-Ĵanejro, en 1807 loĝis en Brazilo. En marto 1816, post kronigo de lia patro kiel reĝo de Portugalujo, iĝis reĝa princo. En tiu jaro edziĝis al Carolina Josefa Leopoldina, arĥidukino de Aŭstrujo. Post reiro de Portugala kortego al Lisbono, en aprilo 1821, Petro iĝis regento de Brazila Regno. En la 9-a de januaro 1822 ekis prepari la juran sendependecon de Brazilo. En la 7-a de septembro, en San-Paŭlo deklaris la Brazilan juran sendependon. En Rio-de-Ĵanejro, je la 12-a de oktobro iĝis imperiestro de Brazilo kaj kronita je la 1-a de decembro. En 1826, kiam mortis lia patro, iĝis reĝo de Portugalujo, kiel Petro la 4-a. En 1829, post la morto de unua edzino, li edziĝis al Amélia de Beauharnais, dukino de Leuchtenberg. En 1831 rezignis pri la Brazilan trono kaj reprenis la portugalan. Li mortis en la 24-a de septembro 1834 en la palaco Queluz, 36-jaraĝe.